Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

PLENUMITA 17/01/2015 Ducenta eldono 17/01/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else



SENDATA AL 275 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj


Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisnunigitan informon **ABC nova**

Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

La numero 200



Gratulon al la Aŭstraliaj Esperantistoj

Subtenu ĝin. Jam 200 numeroj. Sendu artikolojn!

Pasintaj numeroj de 'A E' http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Esperanto Pocket Textbook estas PROPAGANDILO

Uzu, fordonu, semu Esperanto-semojn. Ne lasu kopiojn sur bretoj.

Eble 1000 ekzempleroj estis fordonitaj al la AEA kongresanoj por estonta fordono.

Du pecoj de A4 papero bezonataj por presi la 32-paĝan libreton http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo

54. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO



LA INFINITIVO.

La infinitivo estas verbo, sed esprimante agon kiel nedifinitan okazon. Ĝi do en si mem ne indikas tempon nek modon, kiuj difinoj uzatas nur ĉe la aliaj verboj, la finitivaj. Ĝi tamen aperas en unu el la kvar voĉoj. Ĝi povas funkcii kiel subjekto, kiel objekto, kiel predikativo, kiel adjekto kun certaj iuj prepozicioj, kiel epiteto, kaj kiel suplemento kun certaj iuj prepozicioj. Jen ekzemploj: "Ami (subjekto) estas morti (predikativo) iomete"; "Tia vojaĝo necesigas lui (objekto) aŭtobuson"; "Li laboras por sin vivteni (adjekto)"; "Lia decido pli frue retroveni (epiteto)"; "La piloloj anstataŭ vivi (suplemento) sane".


Same kiel la participoj adjektivaj, la infinitivo povas ĉehavi ĉiujn siajn objekton kaj adjektojn, sed ne sian subjekton, ekz. "Ŝia kapablo transnaĝi la lagon en du horoj".

Zamenhof diktis, strange, ke antaŭ infinitivo povu uzati nur kvar el la prepozicioj, nome por, anstataŭ, krom, kaj inter, kaj la subjunkcioj antaŭ ol kaj post ol. Regule uzatas ankaŭ "sen". Ne estas tialo, kial fari esceptojn kaj ne uzi la infinitivon post ĉiuj prepozicioj , kie la senco tion allasas: "El esti juna ŝi kantis operariojn" kaj "Pro malsati ni haltis".

Marcel Leereveld.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Sendu viajn fejsbukajn Esperanto-novaĵojn ankaŭ al la Novaĵletero.



La Esperanto-Doma Gastdormeja Novaĵo.

Jesa (Hyon-suk) KAJ koreinoj restos ekde la 14-a ĝis la 23-a de januaro.

Sendu ĉiujn petojn por resti ĉe la gastdormejo al LA SEKRETARIO per retmesaĝoj al: gymea@hotmail.com; rspring@tpg.com.au; **kaj** nsw@esperanto.org.au;

Ĉu iu leganto povus viziti, ĉiĉeroni, helpi la gastojn? Sendu retmesaĝon al rspring@tpg.com.au; **kaj** nsw@esperanto.org.au por plusendo al la gastoj.

Mi povas helpi la venontajn gastojn. Ĉar mi ne havas aŭtomobilon, mi povas proponi vojaĝi per publika transporto - trajno, aŭtobuso, trans-havenaj ŝipetoj.
Margaret Chaldecott

AEA 2015 kongreso de Esperanto kaj somerkursaro, Melburno Aŭstralio





Jen la plej juna partoprenanto en la Melburna kongreso 12-jara Madeline kaj la plej maljuna 97-jara Marcel dum la ekskurstago.

Partoprenantoj el 4 landoj: Ĉeĥio, Koreujo, Novzelando kaj Aŭstralio



Tri kongresaj filmetoj faritaj de Nicole

https://www.youtube.com/watch?v=xo_MmnjVgpI Ilia el Indonezio
https://www.youtube.com/watch?v=Sk05Ly2pu4w la plej juna partoprenantino
https://www.youtube.com/watch?v=Bmy15ViPprI Rikardo kaj Maruŝka

Sezonaj Bondeziroj de niaj legantoj

MI BONDEZIRAS AL LA AUSTRALIAJ ESPERANTISTOJ FELIĈAN NOVAN JARON DE PROGRESO! AMIKE *RENATO CORSETTI*

Dankon pro via bona kaj diligenta laboro pri la bulteno. 2015 estu bonega jaro por vi persone kaj nia movado. Trevor kaj Katja

Koran dankon al vi (Roger) kaj Mei, Feliĉan Jaron 2015, Franciska

Dankon pro la kristnaskaj bondeziroj. Mi dankas vin pro via diligenta poresperanta laboro kaj deziras al vi bonan sanon kaj multe da energio en la venonta jaro. Amike, Katja

Dankon ke vi sendis la Novaĵleteron al mi. Mi ŝatas ĝin. Plej amike, Teo

Kara Roger
Mi treege dankas vin pro viaj interesaj kaj ĝustatempaj informoj dum la tuta pasinta jaro.
Mi deziras al vi bonan novan jaron, restu sana kaj feliĉa.

Amike, el Germanujo, Hermann

Nicole, ĉampiono por 2014 en la kvizo de edukado.net



En 2014 Nicole Else ĉiun tagon respondis al 2 aŭ 3 demandoj en la kvizo de edukado.net kiu nomiĝas Risko. La demandoj temas pri Esperanto-kulturo, movado kaj lingvo kaj ofte estas tre malfacilaj. Ŝi sukcesis kolekti la plej multajn poentojn: 882 poentojn. La dua plej bona ludanto estis Valentin Melnikov el Rusujo, la tria Ivan Bujdoso el Hungario. Estis 312 ludantoj en 2014 el sesdeko da landoj. Nicole gajnis jaran retan abonon al la revuo La Ondo de Esperanto. Gratulojn al ŝi.
Ĉu vi deziras esti la ĉampiono por 2015, ludu vi mem ĉe http://edukado.net/ludoj/risko
Ĉion bonan, Henriette

edukado.net

Al ĉiuj 3800 membroj de edukado.net mi deziras tre belan kaj sukcesplenan novan jaron, plenan je bonaj novaĵoj kaj atingaĵoj.

Mi aparte salutas miajn proksimajn kunlaborantojn: Sylvain Lelarge, Mogens Rude Andersen kaj Leandro T. Abrahão, kiuj multe helpis ankaŭ en la pasinta jaro.
Korajn dankojn kaj bondezirojn al niaj ĉi-jaraj subtenintoj kaj precipe al tiuj 31 personoj, kiuj reage al nia kampanjo, aĉetis pecon de la festa abio por ankaŭ tiel subteni la laboron ĉe la paĝaro.
Dankon al:
Anne kaj Claude Jausions, Arja Marita Kuhanen, Bert de Wit, Cvi Solt, E James Lieberman, Familio Slezák, Gaby Tréanton, Giorgio Denti, Gisella Macioszek, Hazel Green, Heinz-Wilhelm Sprick, Ilona Koutny, Ineke Emmelkamp, Ivo SCHENKEL, Jean-Claude Roy, Jeanne-Marie Cash, Jennifer Bishop, José Renato Rodrigues de Carvalho, Lee Miller, Magdaléna FEIFIĈOVÁ, Malcolm Jones, Mónika Molnár, Monique Arnaud, Nicole Else, Patrick Morando, Presence Bouvier, Raita Pyhälä, Ricardo Araujo Pinto, Sten Svenonius,Sylvia Hämäläinen, Synnöve Mynttinen. -- Salutas vin, Katalin Kováts, redaktoro

Globeto intervjuas Julián Hernández (en Esperanto)




Pasintjare mi konatiĝis kun tiu kuba esperantisto dum la ILEI konferenco. Estus bone se iam li venus al Aŭstralio, ĉar lia kantado certe helpus havi tre agrablan etoson.
https://www.youtube.com/watch?v=uohsByeo_BM
Amike, Nicole

Mesaĝoj de Svetislav Kanaĉki

Sinceran kondolencon al familio Enderby pro la perdo de edzo, patro, avo. Esperanto perdis bonegan amikon kaj samideanon konatan tutmonde. Li estis kolego sen kiu, ni ne havus 3zzz radian Esperanto-programon. Vi restos en niaj memoroj por ĉiam.
Svetislav Kanaĉki

Pro miaj sanaj problemoj persone kaj de la edzino mi ne povis partopreni la AEA kongreson en Melburno: bedaŭrinde estis okazo renkonti malnovajn kaj novajn esperantistojn eksterlandajn kaj enlandajn kiujn mi ne vidis dum longa tempo. Svetislav Kanaĉki

Dankon al ĉiuj subskribantoj de la bela karto dezirante bonan sanon kaj revidon baldaŭ.
Dankon karaj amikoj, estis granda surprizo por mi. Svetislav Kanaĉki



Esperanto-Domo Sidnejo


Margaret, Ian, Roger laboris, Mei, Jesa ĉeestis. Ni foriris frue por veturi al la funebra ceremonio por Kep.
La venonta aferkunveno okazos 01 Februaro (ne je la lasta Dimanĉo de Januaro)

Kep Enderby



Foto sendita de Nicole

La 14-an de januaro, 2015 estis la entombigceremonio de Kep Enderby. Ĉirkaŭ 150 homoj, inter ili 8 esperantistoj ĉeestis.
Jen hodiaŭa artikolo pri Kep Enderby en Sydney Morning Herald (angle).
Rainer
http://www.smh.com.au/comment/obituaries/former-federal-attorney-general-kep-enderby-remembered-among-his-peers-20150113-12nqcy.html



Esperantistoj skribis en la gastlibro de Sydney Morning Herald. Visit the Guest Book

Adiaŭ kara Kep. Unu el la steloj de nia movado, kaj ankaŭ elstara parlamentano. Pli ampleksa nekrologo aperos en venonta ESK. Elkorajn kondolencojn al Dorothy kaj la familio.
Vera Payne

Kep estis elstara Membro de nia Asocio kaj tra la Esperanta mondo.
Ni donas niajn kondolecojn al Dorothy kaj al liaj familianoj.
Roger Springer, Prezidanto de la Esperanto-Federacio de NSK

Korajn kondolencojn al Dorothy. Kep estis ege elstara esperantisto kaj ni estas tre dankemaj por lia laboro por la Esperanto-movado en Aŭstralio kaj en la tuta mondo.
Nicole Else

Ĉu Esperanto havas kulturon?

Jen teksto legebla en la angla, Esperanto kaj hispana.
Kelkaj homoj, aparte tiuj kiuj kontraŭas Esperanton, insistas ke Esperanto ne havas kulturon. Tial ĝi ne estas vera lingvo kiel la naciaj lingvoj. Ŝajne tiuj homoj ne povas kompreni ke oni povas havi kulturon kiu ne estas nacia kulturo. Ili pravas ke Esperanto ne havas nacian kulturon, sed tio ne signifas ke Esperanto ne havas ian kulturon. Esperanto ja havas kulturon, sed ĝi estas internacia aŭ tutmonda kulturo. Ktp Legu plu ĉe http://www.icxlm.org/kulturoa.htm Sendis Nicole Else

Esperanto-klavaro https://itunes.apple.com/au/app/id951119795

Nun estas havebla pli bona Esperanto-klavaro por iPhone/iPad kun iOS8. Oni povas facile ŝanĝi inter la kutima klavaro kaj la Esperanto-klavaro, kaj tajpi rekte en iu ajn programeto:
Sendis Joanne Johns

Fluent in 3 months



Benny Lewis poligloto kaj Esperantisto venos baldaŭ al Aŭstralio.
Li vizitos Melburnon, Sidnejon kaj Brisbanon.

https://www.facebook.com/events/277202802403878

http://www.fluentin3months.com/book-tour/

Amike, Nicole



Estontaj kompetentaj Esperantistoj

aŭskultas la retradion (Esperantujo) ĉiun tagon

http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj tage Klaku, Aŭskultu, Spertiĝu

AEA Informas

Aŭstralia Esperanto-Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

2015-01-15 AEA raportas:

Nian lastan Skype estrarkunvenon (15/01/2015) ĉeestis:
Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Margaret kaj Sandor

*** PASINTA KONGRESO EN MELBURNO**

- Ni taksis la (mal)sukceson de la lasta kongreso en Melburno. Ĝenerale, la estraro pensas ke la kongreso sukcesis.
Resumo de komentoj baldaŭ aperos sur nia retejo

***VENONTAJ SKYPE KUNVENOJ**

Ni decidis havi niajn Skype kunvenojn nur ĉiun trian semajnon, almenaŭ dum la unua parto de 2015. Samtempe ĉiu estrarano promesis regule rigardi kaj komenti la AEA estrarkunvenpaĝon ĉe google docs.
La venontaj Skype kunvenoj estos jaŭde
05/02, 26/02, 19/03, 09/04, 30/04, 21/05, 11/06, 02/07, 23/07

*** ARĤIVO**

Ni diskutis la valoron komenci skani materialojn. Ni komence aldonos kelkajn skanitajn historiaĵojn, kiujn ni jam havas. (Jonathan & Heather)

*** ESK**

Laŭ nia redaktoro, Joanne la ĉiutagaj laborsesioj estis bona sukceso kaj ni tutcerte havos multe da materialoj por la venonta numero.
Ni invitos David Ryan por diskuti ESK dum nia venonta Skype kunveno (05/02)

*** VENONTA KOMUNA KONGRESO EN BANDUNG (INDONEZIO) – MARTO 2016**
Jonathan kolektas demandojn por Ilia. Ni celas havi trilingvan flugfolion por reklami pri nia venonta trilanda kongreso en Bandung dum la venonta UK en Lille.
Ni invitas la NZ-anojn partopreni nian venontan Skype kunvenon (05/02) por pli esplori tiun proponon.

*** KVINSLANDO**
Ni vere ŝatus raportetojn el Kvinslando kelkfoje. Joanne klopodos kontakti ilin dum sia venonta vojaĝo al Brisbano.

La venonta Skype estrarkunveno okazos jaŭdon, la 05-an de feb 2015, je la 19:00 (18:30)
Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Margaret, Sandor

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Se vi trovis eraron, aŭ mankon informu AE

"Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

http://youtu.be/A6Qg88fpDY8 38 minutoj da Bona Esperanto, Bonaj Konsiloj

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ 5 minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine

Vi nur bezonas 5 minutojn ĉiun tagon por tiu programo. ☺ ★★★

Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj tage Klaku, Aŭskultu, Spertiĝu

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Por pli longdaŭraj, bonaj aŭskultadoj elektu sube:-

http://esperanto-radio.com/3zzzradio **(Radio Melburno)**
http://esperanto.cri.cn/radio/info.htm
http://pola-retradio.org
http://muzaiko.info
http://www.radio-vatikana-esperanto.org
http://www.ameriko.org/radiokubo
http://www.budhano.cn/podkasto
http://www.podkasto.net
http://www.ameriko.org/eo/radioaktiva



Ne eblas lerni naĝadon sen mergiĝi en akvon. Ne eblas lerni lingvon sen mergiĝi en tiun lingvon. Aŭskultu Esperantan radion per la reto. aŭ pli?

La Kluboj

Se la suba kluba informo eraras, ne plendu, informu min. Roger rspring@tpg.com.au

La Manlia Esperanto-Klubo. unua kaj tria Sabato. 10atm Roger Springer 02 9976 0632

La Brisbana Esperanto-Societo Kvara Sabato 1ptm Kay Anderson 07 3372 7006

La Brisbana Esperanto-Kafoklubo Kvara Sabato 3ptm

Esperanto-Grupo de Centra Marbordo Dua Dimanĉo 2ptm

La Tasmania Esperanto- Societo Jaŭde 7ptm

La Melburna Esperanto-Klubo Lunde 6.30ptm

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Vendrede 5ptm

Esperanto-Domo, Sidnejo Lasta ?? Dimanĉo 11atm Roger Springer 02 9976 0632

Torkio Esperanto-Kafo-Klubo, Viktorio unua Sabato, 1.00ptm 03 5261 2899

Esperanto en Sudaŭstralio The Box Factory, 59 Regent St South, ADELAIDE unua merkredo 08 8242 1460

Adelajda Esperanto-Grupo, Adelajda Esperejo, 81/9 East Tce, ADELAIDE ĉiu sabato 08 8359 3375

Esperanto League of Western Australia Inc. unua kaj tria Sabato (08) 9343 9532.

La Ricevantoj de "Aŭstraliaj Esperantistoj"

Individuaj ricevantoj de Esperanto-elsendaĵoj per la reto kaj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

La noma listo de "Aŭstraliaj Esperantistoj" en havas homojn kun konata nomo kaj retadreso

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.

Mi ne aldonas iun ajn retadreson se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rspring@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantistoj" estas uzata krome por sendi

Tamen Plu, Telepeon, urĝajn anoncojn kaj se vi deziras, vian bonan ret-gazeton al ĉiuj homoj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

	First name	Family Name												
			60	Colin	Robinson	120	Herve	Diviciacos	180	Ljiljana	Popovic	240	Philip	Nichols
1	Abid	Afridi	61	Crystal	Hill	121	Howard	Gravatt	181	Louise	Blyton	241	Philip	Smart
2	Adam	Olechnowic	62	Cyrille	Hurstel	122	Hugh	Ramage	182	Luke	Marsillo	242	Rae	Watson
3	Adrien	FOLLIN	63	Dale	McManus	123	Huigh	Malcolm	183	Lumera	Nohill	243	Rainer	Kurz
4	Alan	Turvey	64	Dan	no name	124	Humphrey	Tonkin	184	Marc	James	244	rani	lyons
5	Alan	Bishop	65	Daniel	Kane	125	Ian	McArthur	185	Marc	Schmidt	245	Rees	Pearse
6	Alan	Mendelawitz	66	Daniel	Forrest	126	Ian	Green	186	Marcel	Leereveld	246	Renato	Corsetti
7	Alan	Collinson	67	Danton	Black	127	Ian (Jano)	Wylles	187	Marcus	Dohring	247	Renjo	Oren
8	Alan	Dean	68	David	Dalgleish	128	ilia	Dewi	188	Marcus	Gabor	248	Richard	Delamore
9	Alen	Basic	69	David	Dewar	129	Indrani	Beharry-Lall	189	Margaret	Chaldecott	249	Richard	Marcus
10	Alex	Huggett	70	David	Kidd	130	Indu	Thapalia	190	Margaret	Yue	250	Richard	Penman
11	Amanda	Markham	71	David	Ryan	131	Ivan	Pivac	191	Margarita	Pavlova	251	Rikardo	Newsum
12	Amy	Regal	72	Dennis	Murphy	132	Jackson	Raeburn	192	Maria	Jojkitty	252	Robert	Budzul
13	Andre	Samosir	73	Deshan	An	133	Jacob	Sacher	193	Marie	Robert	253	Robert	Hoogenboom
14	Andrea	Witt	74	Dianne	Lukes	134	Jaga	Oprzedek	194	Marika	6tg	254	Robert (Bob)	Bain
15	Andrew	Adams	75	Dianne	Mitchell	135	Jaiden	Golding	195	Marina	Lobanova	255	Roger	Springer
16	Andrew	Lutz	76	Dmitri	Lushnikov	136	James	McElvenny	196	Marja	Niesen	256	Roger	Hill
17	Andrew	Maybury	77	Donald	Rogers	137	Jane	Allen	197	Mark	Pavic	257	Ronald	Gates
18	Andrew	Spannenberg	78	Dorothy	Bysouth	138	Jared	Martin	198	Mark	Smith	258	Rouan	van Ryn
19	Angela	Maag	79	Dorothy	Enderby	139	Jason	Covell	199	Martin	Gray	259	Ruth	
20	Anne	Sanders	80	Doug	Eising	140	Jay	Mooney	200	Marumi	Smith	260	Sandor	Horvath
21	Archana	Joshi	81	Duncan	McDonald	141	Jean	Huelsbeck	201	Maruŝka	Struminskov	261	Sandor	Monostori
22	Arnie	Schaaij	82	Dzejlana	Haveric	142	Jeff	Cullinan	202	Mary	Mills	262	Sandra	Connors
23	Barbra	Stephen	83	Edith	Mejia	143	Jennifer	Birchall	203	Mason	White	263	Shayne	Power
24	Barbra	Treharne	84	Edna	Watson	144	Jenny	Bishop	204	Matthew	Maguire	264	Shirley	Gradussov
25	Barrie	Cledsmith	85	Eko	Nur Hidayat	145	Jim	Radford	205	Max	Wearing	265	Shresta	Kishor
26	Barry	Healy	86	Eleanor	Perno	146	Jo	Turvey	206	Michael	Carney	266	Sibel	Lewis
27	Benjamin	Hook	87	Elijah	McDonald	147	Joanne	Johns	207	Michael	LoSordo	267	Sidney	Wolifson
28	Benno	Lang	88	Elizabeth (Libby)	Mortimer	148	Joffre	Bell	208	Michael	Waters	268	Siu	Chan
29	Benny	Milligram	89	Elrae	Adams	149	Johano	Massam	209	Michael	Zhang	269	Stephen	Pitney
30	Bert	Schumann	90	Erhard	Claus	150	John	Casey	210	Mick	Gallagher	270	Stephen	Landman
31	Beth	Wearing	91	Erin	McGifford	151	John	Fleming	211	Mike	Leon	271	Steven	Garamy
32	Beth Maree	Shields	92	Esperanta	Retradio	152	John	Abood	212	Mike	Taggart	272	Svetislav	Kanachki
33	Bettie	Hart	93	Esperanto	muzeo	153	John	Adams	213	Mikel	Rizo	273	Szilvasi	Laszio
34	Betty	Chatterjee	94	Esther	Parris	154	John	Calder	214	Miranda	Lutz	274	Teodomiro	Clavis
35	Bharat	Ghiomire	95	Finnur	Larusson	155	John	Forbes	215	Mohammad	Jabbar	275	Teofilo Jose	De Jesus
36	Bill	Starke	96	Franciska	Toubale	156	John	Gallagher	216	Morgan	Day	276	Terry	Manley
37	Bill k Mabel	Wybenga	97	Francisko	Zilli	157	John	Lang	217	Nancy	Roy	277	Tiffany	Liu
38	Birgitta	Carney	98	Frits	van Scheepen	158	John	Garvey	218	Neville	Aubrey	278	Tim	Stackpool
39	Blaze	Doric	99	Fujun	Xiao	159	Jonathan	Cooper	219	Nicole	Else	279	Tim	Warren
40	Bob	Felby	100	Gerry	Phelan	160	Jonathan	Moylan	220	Nigel	unknown	280	Todd	Herbert
41	Bona Volo	Brazilo	101	Giles	Thomson	161	Kam	Lee	221	Obed	Niyo	281	Trevor	Steele
42	Bradley	McDonald	102	giri	Rao	162	Katarina	Taggart	222	Olga	du Temple	282	Trish	O'Connor
43	Brendan	Linnane	103	Glyn	Truscott	163	Katja	Steele	223	Owen	Loneragan	283	UEA	UEA
44	Brian	Barker	104	Gordon	Coleman	164	Kay	Andersen	224	Pamela	Fenton	284	Utho	Maier
45	Brian	Dance	105	Grace	Alvarez	165	Kehui	Bao	225	Patricia	Palmer	285	Valencia	Tan
46	Brodie	May	106	Graham	Fennell	166	Keith	Bowling	226	Patrick (Lize)	Zhang	286	valery	matushkov
47	Bruce	Muhlhan	107	Gregg	Libby	167	Ken	Rolls	227	Paul	Burger	287	Vera	Payne
48	Caitlin	McCluskey	108	Gus (Ago)	Faith (Ferrosa)	168	Kerry	Robson	228	Paul	Green	288	Vicky	Crickett
49	Cal	Milligan	109	Halinka	Ejsmont	169	kevin	kenefick	229	Paul	Desailly	289	Volo	Gueltling
50	Carol	Lutz	110	Happax	Legomenon	170	Kevin	Warburton	230	Paul	Gorny	290	Wally	du Temple
51	Caroline	Turner	111	Harold	Sĉmitz	171	Kiah	Morante	231	Paulo	Cesar	291	Yvan	Serve
52	Catherine	Chen	112	Hazel	Green	172	Kieu Tu	Duong	232	Pedro	Abreu	292	Yvonne	Harvey
53	Chan	SY	113	Heather	Heldzingen	173	Kirsi	Rossi	233	Penny	Vos	293	Zachary	Grant Fedricksen
54	Charles	Stevenson	114	Helen	Munro	174	Lauren Victoria	Smith	234	Peter	Johns	294	Zoe	Krznaric
55	Chris	Krageloh	115	Helen	Webb	175	Laurie	Kirwan	235	Peter	Bird			
56	Chris	Morrow	116	Helen	Palmer	176	Lenny	g-----b	236	Peter	Mitchell			
57	Christine	Paul	117	Henriette	Vanechop	177	Leonie	McGlashan	237	Peter	Weide			
58	Christine	Holliss	118	Henry	Broadbent	178	Libby	Farris	238	Peter	Willshire			
59	Claudia	Layton???	119	Hermann	Kroppenberg	179	Linda	Fields	239	Peter	Cummins			

La Novaĵletero de Aŭstraliaj Esperantistoj

Pasintaj numeroj de 'Aŭstraliaj Esperantistoj'
Sur la **retpaĝo de AEA** http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

La ,Aŭstraliaj Esperantistoj' (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.
Skribu al ĉirkaŭ 290. individuaj legantoj, sed en Esperanto, mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne

La novaĵletero 'Aŭstraliaj Esperantistoj' subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin esti ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekto, oni faras nenion, ĉar la morto atendas vin.
Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

Interesaj faktoj por Propagando

Mezura sistemo havas metron logikan facilan sistemon ekde 1795.
Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Ĉu lernanto preferus lerni la metran sistemon aŭ la britan sistemon?

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.
Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).

En Hungario Esperanto estas elektebla lingvo kiel antaŭfako por universitataj studoj. Miloj da gestudentoj ĉiujare lernas Esperanton.

Eĉ la fuŝa studo de la angla faciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj

Interesaj artikoloj en pasintaj Novaĵleteroj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

La historion de la originala Ŝlosilo ĉe paĝo 7 AE191

"Discover Esperanto".Ĝi estas angla traduko de la Esperanto-libreto "Malkovru Esperanton",

Iloj por Esperantistoj

Esperanto-Flago por tabloj ĉe kunvenoj. Vidu AE158. Bona propagandilo.
http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo

Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Kiam, Kie, Kio okazas Esperanto-renkontiĝoj en 2014 kaj Poste. En la mondo

Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Unu el la pli facilaj metodoj **http://esperanto.typeit.org/ senpage aŭ**
eĉ Pli facila http://www.typeit.org/app/?lang=esperanto&side **$12.50c**

Aliaj solvoj

La specialaj Esperanto literoj estas ĉiuj en la ''Latin 3 Symbols'' supre dekstre sub ''Insert''. Oni alklakas ''Insert'' kaj dekstre aperas ''Symbols''. Oni povas instali la Esperanto literojn sur la klavaro.

aŭ

Por vindozaj komputiloj senpagaj Ek! aŭ Tajpi aŭ vidu sube

Angle http://en.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters,

Esperante : http://eo.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters

iPhone

Nun estas havebla pli bona Esperanto-klavaro por iPhone/iPad kun iOS8. Oni povas facile ŝanĝi inter la kutima klavaro kaj la Esperanto-klavaro, kaj tajpi rekte en iu ajn programeto:
https://itunes.apple.com/au/app/id951119795

La epoŝta programo "gmail" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone

Uzi Esperantajn literojn por Mac OS X

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo Vidu AE191

Lecionoj, Studoj, Legado, Muziko

Nun vi povas lerni ankaŭ Esperanton per **lingibli.** http://eo.lingibli.com/

Duolingo. Unu el la plej utilaj atingoj por Esperanto estas ke ĝi lerneblos per la ege ŝatata retejo Duolingo.. https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en

lernu! - Learn **Esperanto** online. Live tutors, dictionary, books & music **lernu**.*net/*

17.528 homoj ŝatas Lernu.. Entute estis **15 508 190** vizantoj

Rekomendata Legado, Videoj

"Mirmekobo," de Donald Broadribb www.gazetejo.org/eo/mirmekobo

"Tamen Plu" de Katarina Taggart. Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Telopeo" de EFNSK Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Esperanto sub la Suda Kruco" AEA www.esperanto.org.au info@esperanto.org.au
Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj

EsperantoTV http://www.esperantotv.net/

http://ckuik.com/Esperanto Eniro je Multegaj Esperantaj videoj de Jutubo

Filmetoj de Gian Piero Savio http://vimeo.com/album/2111699

http://www.bookbox.com/ La rakontoj estas laŭtlegataj de diversaj personoj

The Simpsons https://www.youtube.com/watch?v=M_77-WMZ1nY

LA ESPERO Esperanta himno Bonega por Zamenholaj Festivalaj kunvenoj
Esperanta kunkanto (Karaoke) kun A-cappella Ĥoruso

Gastdormejo de EFNSK

La ĉefa rolo de la Gastdormejo estas helpi la anojn de EFNSK ĉeesti EFNSKajn kunvenojn.
per eventuala dumnokta dormloko ĉe ED post aŭ antaŭ la kunvenoj.
La **GASTDORMEJO** de EFNSK devas esti antaŭmendita de estontaj Esperantistaj gastoj.
Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn. Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin prepari la gastdormejon.
La Sekretario de la EFNSK prizorgas la gastdormejajn mendojn.`
Petu ŝin pri ebleco gastiĝi.
Kiam vi kontaktas Esperanto-domon pri la gastdormejo uzu la 3 retadresojn sube.
gymea@hotmail.com; rspring@tpg.com.au; nsw@esperanto.org.au;

Lokaj Aŭstraliaj Esperanto-Kluboj **Listigitaj en la AEA ret-paĝoj kaj Aliaj**	Vidu AE184	Vidu AE185	Vidu AE186	Vidu AE187	Vidu AE188	Vidu AE189	Vidu AE190	Vidu AE191	Vidu AE192	Vidu AE193	Vidu AE194	Vidu AE195	Vidu AE196	Vidu AE197	Vidu AE198	Vidu AE199	Vidu AE200
AEA informas		AE185		AE187		AE189		AE191		AE193	AE194	AE195	AE196		AE198	AE199	AE200
Brisbana Esperanto-Societo																	
Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo																	
Centra-Marborda Esperanto-Klubo		AE185	AE186	AE187				AE191									
Esperanto-Federacio de Nov-Sud-Kimrio	AE184	AE185		AE187		AE189	AE190	AE191	AE192	AE193	AE194	AE195	AE196	AE197			
Esperanto en Sudaŭstralio	AE184					AE189		AE191				AE195					
Esperanto-Federacio de Viktorio													AE196				
Esperanto -Kafo-Klubo De Kanbero																	
Esperanto-Ligo de Okcident-Aŭstralio									AE192								
Esperanto-programo de 3ZZZ Aŭstralia				AE187					AE192			AE195					
Manlia Esperanto-Klubo	AE184	AE185	AE186		AE188		AE190		AE192		AE194			AE197			
Melburna Esperanto-Asocio			AE186		AE188	AE189		AE191			AE194		AE196				
Melburna "Meetup" Grupo		AE185															
Tasmania Esperanta Societo																	
Toowoomba Esperanto-Societo																	
Torkia Esperanto-Kafo-Klubo																	

Informu AE se la listo eraras rspring@tpg.com.au

Sendu informon pri via klubo

Estigu parto de la estonta historio de Esperanto ĉe Aŭstralio

Alvoko por la Internacia Virina Tago 2015

sendis Jennifer Bishop

Skribas OSIOKA Taeko el la urbo Hirosima, Japanio.
Ni Hirosima Esperanto-Centro kiel unu el 22 organizoj sub Plenuma Komitato de Internacia Virina Tago 2015 Hirosima sendas al vi mesaĝon. Ni petas vin doni al ni vian respondan mesaĝon por la Tago, kaj transdoni nian mesaĝon al viaj geamikoj, viaj asocioj.
Ni ekspozicios vian mesaĝon ĉe publikaj ejoj de la urbo Hirosima, prezentos en la kunveno de la Tago.
Limdato estas la 15-a de februaro 2015, por ke ni ekspoziciu la mesaĝojn ekde la 24-a de februaro. Kun antaŭdankoj, (s-ino) OSIOKA Taeko
Mesaĝo por la Internacia Virina Tago de UN 2015, Hirosima
Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo.
Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2015 Hirosima konsistas el 22 organizoj kaj la municipo Hirosima, salutas vin solidarece,kaj elkore alvokas al vi. En la 8-a de marto, 2015, por la Internacia Virina Tago de UN en la 8-a de marto, ni havos kunvenon por kunlaboro per saĝoj kaj fortoj, kaj antaŭen puŝi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.
Virinoj de la gubernio kaj de la urbo organizas kunlaboron por heredigo de la urbo paca al sekvanta generacio.
Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antaŭenpuŝo de komuna partopreno de geviroj.
En aŭgusto antaŭ 70 jaroj la nuklebomboj en sekundoj detruis la du urbojn Hirosima kaj Nagasaki, rabis 210 000 vivojn.
Hodiaŭ ankoraŭ daŭras sufero de pli ol 200 000 Hibakŝoj, bombitaj de nuklea armilo. Sed, pli ol 16 000 nukleaj misiloj ankoraŭ nun restas ekipitaj kaj tuj lanĉeblaj en la mondo.
Nun por nuligi ĉiun nuklean armilon necesas agado en civitana nivelo kaj movi sian registaron en multaj landoj.
Temo de la Internacia Virina Tago 2015 Hirosima estas:
“En 70-a jaro post la atombombado pacon protektu ni mem, se ni ne agadas, nenio ŝanĝiĝos.”
En tiu tago, 8-an de marto, ni havos prelegon, elpensos, kion lanĉi al la mondo el atombombita Hiroŝimo. Ni mem aktivu por paco kaj por detruado kaj malpermeso de ĉiuj nukleaj armiloj.
YOSIDA Mariko(s-ino) Prezidanto de la plenuma komitato
Municipo Hirosima, Japanio
Kun virinaj organizoj:
Arko de Hirosima/ Konsilio Yui-porto / Kina karavano/ Novjapana virina asocio/ Ligo de vartistoj/
Hirosima Esperanto-Centro/ Ligo de medicinaj sindikatoj/ Sindikato de emeritoj/ Instruista laborsindikato/
Ligo de solaj patrino k infano(urba)/ Laborsindikato de municipaj oficistoj/ Laborsindikato de urbaj oficistoj/
Ligo de patrinoj de la urbo / Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hirosima/ Ligo de virinaj asocioj WENET/
Ligo de Komercistoj/ Virina demokrata klubo/ YWCA/ Centro de komuna partopreno de geviroj en la socio/
Ligo de Patrinoj de la gubernio/ Sekcio de komuna partopreno de geviroj de municipo hirosima/
Konsilio de Kino-rondoj de la urbo.

Limdato kaj aliaj: la 15-a, februaro 2015.
Maksimume sur unu leterpapero A-4 formata. Ankaŭ viroj rajtas skribi al ni.
Kun notoj petataj: Nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko(urbonomo), lando.
Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp
Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio